GISTO, JAN – 2006

VASKE, Georgo Otto,
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo.

ANGLA LINGVO? – FACILA!

Jen ero, far Jean Marin, en lia franclingva libro *Une lange pour L'Europe*, publikigita en la januara revuo Esperanto: - Kiel loki la akcenton en anglaj vortoj? Tute simple: sufichas lerni apliki 5 chefajn regulojn, 40 klasojn da esceptoj kaj 120 klasojn da esceptoj al esceptoj! (laù J.Wells) aù, se iu neanglalingvano pretendas ke la angla lingvo estas facila, tuj petu ties helpon por traduki du aù tri anglajn esprimojn tute ordinarajn, sed kiujn vi ne komprenis. Ekz.: when hi was done in – I'm fed up.

Estu gxi forta argumento, kiam ni reklamas por nia idealo. Ankaù vi, karaj Gistolegantoj, bonvolu prove fari la tradukon de chi du ekzemploj proponitaj. Chu iu riskas diri, kion signifon li/sxi komprenis per la du ekzemploj? – Mi mem havas svagan ideon sed ne riskus veti unu rustan grosxon, por ne kaùzi suspenson inter la cheestantoj...hi...hi.

La RAKONTARO
de F13 gxis Karavele

Statas nun en la fazo de revizio krom aldonajxoj, se hazarde kolego tiutempa bonvolas kontribui per rememorigindaj faktoj. Kiu el vi garantias nete forbalai sxpurojn de koboldoj? – Multaj "mistajpoj" ensxteligxis pro kulpo de la komputilo. Gxi havas kriplan edukon, inklina al la angla lingvo. Kiam mi tajpas TRE gxi skribas TER; kiam , PO gxi faras PÒ, BONE farigxas BONÉ, ERO farigxas ERRO plus multaj alia petolajxoj ensxteligxas, kiam mia kapo bolas dum mi elpensas pli agrablan aù klaran, dirmanieron. Do, revizio espereble purigos la tekstojn.

KOMPRENKAPABLO

Gxis nun al mi ne eblis cheesti al unu el la perfektigaj kunsidoj kiuj okazas en GEA, por evalui la metodon uzatan por igi la komencantojn kompreni la kunmetitajn vortojn, chefe se ili estas kurtaj kaj troveblas ene de kunteksto kiu ne helpas trovi la gxustan signifon. Al tiuj homoj mankas vasta enkapa vortaro. Ili provu disigi prefikson aù sufikson de la radiko. Tio ofte igas la kunmetitan vorton "travidebla" – Iel ajn, neniam pardonu al vi mem, se vi pigre neglektas kontroli ne komprenitan vorton en vortaro. Certe GEA-instruistoj komentas ke, por traduki nacilingven oni devas uzi taùgajn vortojn, jes, sed prefere uzi vortojn diferencajn char la dirmanieroj de sama frazo varias de unu lingvo al alia.

SINTENADO

Sciatas ke chiuj ni trasxvitas la chemizon, por perlabori nian chiutagan panon kaj ke restas preskaù neniu minuto por senjukigi nin, kiam moskito pikis. Tamen, laù mi mankas iom da impulso flanke de Gistolegantoj reage al iniciato proponita, kiel laùtlego de unupagxa teksto aù reciti rimaron, stare, por ke nia grupo elstaru per speciala ero kaj farigxu rimarkinda.

CHO-RO-I

Miaj gekaraj VK-anoj, laùeble mi aùskultas chiutage la radion de niaj chinaj diligentuloj, por iom raporti pri ties aùdebleco. Laù 11700 Khc, kutime, malforta signalo; laù 9860 Khc, gxenerale oni bonege aùdas iliajn programojn. Valoras la penon aùskulti almenaù duonhoron, se al vi mankas tempo, pro hejmaj farendajxoj. Nur legado kaj konstatnta aùskultado lertigas kaj sumas novajn vortojn en via pensejo. Aldone, permesu al mi karese tireti viajn orelojn. Okazas ke lunde la radio disaùdigas tekstojn el leteroj ricevitaj de aùskultantoj. Ofte oni aùdas nomojn de konatuloj, inkluzive tiun de nia najbarurba amikino Alice. Laù tio vi povas diveni mian celon: ke mi neniam aùdis nomon el nia grupo el kafumantoj. Certagrade mi rajtas diri ke vi tute ne zorgas chu la china radio daùrigos la elsendadon per kurtaj ondoj aù ne. Tamen, memoru ke eble nur 30% da samidenoj posedas komputilon kaj ke ne chiuj eltenas pagi la koston de longa telefona uzado, kiel chi emeritulo. Same ITV-elsendojn mi ne plu aùskultis. En la Reto oni iam komentis, ke pro teknikaj motivoj gxi paùzis kelkajn tagojn. Provu spekti kaj opinii en Gisto

BONEDUKITECO

Bona eduko restas post kiam oni kribras al si kaj aliulojn, komencante per si mem, diris klerulo.

SUROGATO

Kara Rejnaldo, revene al chi vorto, dum nia lasta kolaziono kun kaf-bierumado, mi permesas al mi diri, ke gxi ne perfekte anstataùas originalan varon, kuracilon sed ke gxi estas rimedo manke de la originala.

GEORGO DE LA NEGXOJ

Domagxo, domagxo...malgraù ke lia mosxto telefonkontaktis min el Gramado, estigante belan perspektivon, ke li haltos en Kaiurbo, antaù domo kie li ekvidus radioamatorajn antenojn, unu semajnon post kiam li antaùsignis sian ekveturon per sia surrada logxejo, li kaj lia regxino Marlene ne atingis mian adreson. Nu, ni fidu ke li nur plejzorge veturigas kaj ke eble enmiksigxis ne atendita programero pli loga ol elteni "un fuerte rompe kostijxas" de chi grizulo. Nun la poeta sinjorido sxuldas al mi $450,00 kiujn mi elspezis por akiri novajn vestajxojn, por akcepti ilin. Ba...ne kalkulinte la rugxan tapisxon, florojn kaj traktitan muzikistaron. Cetere, pro la duboj mi ankaù duobligis mian bierstokon. Mi mem nun devos sekigi la botelojn. Tio ja ne gravas, se mia lama koro eltenos...hi...hi. Jen, jen... venis en mian kapon, jxus nun, ke la ruzulo silentas char ni vivas la semajnon fine de kiu okazas nia Verda Kafo kaj...kiu antaùscias, kion li preparas, chu belan surprizon per sia cheesto, kun sia vasta repertuaro, por postigxe festi kun ni la 15ªn de Decembro? Por bonstataj geturistoj chio eblas char ilia kaso ne elcherpigxas.

MIKROFONE

Alvenis la trimonata jxurnalo distribuata de Cho-R-I, bele kaj kolore presita, sukoplena , kun multaj interesoaltiraj titoloj kiel, Raporto pri la 6ª China Kongreso de Esp°; Speciala Raporto pri la 4ª Azia Kongreso de Esp°; Cititaj Leteroj ricevitaj en CRI plus multaj titoloj pri E-eventoj; DVD-filmo en Esp° 128 minutojn longa, akirebla che UEA je 12 eùroj; Horartabelo de E-elsendoj kun gxiaj frekvencoj. Petas ensendi fotojn pri eventoj en Brazilo. Alskribu kaj ankaù vi ricevos la buntan MIKROFONE.